Henri Broch en sia laboratorio, 24jan01

# Kio estas Zetetiko?



*Intervjuo de profesoro Henri* BROCH *por La Gazeto, en la laboratorio de "zetetiko" de la fakultato de sciencoj, Universitato Nice-Sophia Antipolis, la 24an de januaro 2001 Jean-Pierre* CAVELAN *faris kaj esperantigis la intervjuon.*

**La Gazeto** Kio vi estas, profesoro Henri Broch?

**Henri BROCH** Mi estas fizikisto, doktoro pri sciencoj, profesoro en universitato Nice-Sofia Antipolis, kie mi instruas fizikon kaj "zetetikon"

**LG** Kiel prezentas sin zetetiko kompare kun fiziko? Ĉu ĝi estas marĝena fako?

**HB** Ne, ĝi ne estas marĝena fako, tamen ĝi estas iom aparta. En tiu ĉi universitato ĝi estas agnoskita kaj la instruado de zetetiko kiun mi disdonas estas fako oficiala, prizorgata laŭstatute de la fizika administrofako. Sed tio estas propraĵo de la universitato de Nice. kio povas klarigi ke, se oni demandas al fizikisto en Parizo, kio estas zetetiko, li eventuale konfesos realan nescion.

**LG** Se mi bone komprenas, la zetetiko ne speciale apartenas al la fiziko, ĉu?

**HB** Ne, la zetetiko estas interfaka, ĝi estas supozata aparteni al ĉiuj studofakoj, sed, ĉar ĝi estas praktikata de fizikisto ene de la Fakultato de Sciencoj de Nice, ĝi estas instruata sub la aŭtoritato de la administrofako pri fiziko kaj sub la respondeco de la Universitato.

**LG** Ĉu aliaj universitatoj interesiĝas ankaŭ pri zetetiko?

**HB** Interesiĝantaj? Jes. Disdonantaj regulan kurson? Ne. Ĉi tie la instruado daŭras de ok jaroj. Sed kelkaj iniciatoj ekaperas. En novembro 2000 kolego de la universitato Paris-Nord (s-ro Élie VOLF), en la Universitata Instituto pri Teknologio (IUT) de Saint-Denis[1], komencis kurson pri zetetiko titolita oficiale "Scienco, pseŭdo-sciencoj kaj Zetetiko" gvidataj ekzercoj dum 6 horoj por studentoj de la 1-a jaro. Kaj en aprilo 2001 alia kolego (s-ro Vincent LAGET) malfermos dekhoran kurson pri zetetiko en la lernejo por inĝenieraj specialistoj pri retoj kaj telekomunikadoj (ESIGETEL) en Fontainebleau[2] Dissemiĝado ekas do, sed ĝi estas apenaŭ komenciĝanta

**LG** Ĉu ekster Francio, aliloke sur la planedo, ekzistas analogaj iniciatoj?

**HB** Tie kaj tie ĉi kursoj de senmistifikado de la paranormo estas disdonataj ne regule, laŭokaze, sed, laŭ mia scio, nenia samspeca instruado estas disdonata en oficiala kursaro aliloke ekster mia universitato. Evidente la ĉi-tiea instruado kondukas al ekzameno.

De ĉi tiu jaro, dum la unua semestro, la studentoj pri Sciencoj de la Vivo kaj de la Tero havas pluse devigan prizetetikan parton, devigan ekzamenon en februaro, kaj, dum la dua semestro, ili devas elekti iun el pluraj instrutemoj proponataj, inter kiuj speciale troviĝas zetetiko. Ĝis la pasinta jaro la instruado estis nur elektebla, sed ĝi altiris entute pli ol 1700 studentoj dum 7 jaroj.

LG **Ĉu oni povas paroli pri nova fako?**

**HB** Fako esta eble tro forta vorto, sed almenaŭ ĝi estas instruado nova, kiu povus iĝi memstara 'branĉo'· por tio necesus ke aliaj kolegoj apogu la klopodadon. Tio tre certe eblas. Ĝis nun, de ok jaroj, mi tute solis; nun du kolegoj, fizikistoj de mia universitato, kunvenis kun mi kaj instruas je gvidataj ekzercoj de zetetiko, kio estas ege kuraĝiga.

LG **Problemo estas ke tiu kiu unuafoje aŭdas la vorton "zetetiko" demandas sin de kie ĝi venas kaj kion ĝi signifas.**

**HB** Jes, efektive. "Zetetiko" ne estas vorto inventita por plezure mirigi publikon de ŝatantoj de laŭmodaj vortoj. Ĝi devenas de la greka *zêtein*, kiu signifas: serĉi. Temas fakte pri scienca branĉo praktikata de la greka antikveco, komence de Pirono, kiu praktikis kompletan skeptikismon. Sed ne en tiu senco ni uzas ĝin, sed laŭ senco vaste metodologia, t.e. por referenci al la kapableco de la homa menso funkciigi siajn kritikajn fakultojn. Persone, mi difinas la zetetikon kiel "La arto de la dubo" Fakte ĝi estas la scienca metodologio. La avantaĝo en la uzado de etkonata vorto, malgraŭ ĝia malnoveco, estas ke tiele oni ne kuntrenas kromsignifon eventuale aĉigan de termino kies sencon plivastigis la uzado. Ekzemplo povas tuj prilumi ĉi tiun ideon: la vorto "raciismo" fundamente esprimus sufiĉe bone ideon sufiĉe proksiman al zetetiko, sed ĝi estis tiom multe uzata de homoj kiuj kulpis, je ĝia nomo, pri kredo-deklaroj, ke nun la vorto perfidas sian analogion kun la vorto zetetiko.

LG **Efektive la vortoj ne porĉiame fidelas la ideojn kiujn ili devas daŭre esprimi. Por reveni al la laboratorio de zetetiko, kie nun ni interparolas, kiel ĝi estis kreita?**

**HB** La laboratorio multe pli novas ol la instruado. La instruado aĝas ok jarojn. Necesis proksimume dek jaroj antaŭ la kreado de tiu ĉi kurso. Ĉi tiu tempo eble ŝajnas longa, sed oni devas kalkuli kun la administraj malrapidadoj de tro peza sistemo La instruado estis sesjara kiam la ebleco krei la laboratorion donacitis dank' al la financa subteno de Jacques THÉODOR, kiu plenumas konstantece kaj doneme sian rolon de mecenato.

LG **Sen tiu ĉi ekstera financa subteno, ĉu la oficiala instruado povus faciligi ĉi tiun novan aktivadon?**

**HB** La instruado – kaj ĝia agnoskado – helpintus al la kreado de la laboratorio, sed ĝi ne povintus alporti la gravajn materiajn rimedojn kiuj igas nian laboron efika. Sen la duondekduo da komputiloj inter si rete konektitaj, kaj rilatantaj al la cetero de la universitata reto, kiu siavice ligatas al Interreto oni facile imagas kiom da homa energio oni domaĝis. Nia TTTejo **http://www.unice.fr/zetetique** estis lanĉita en decembro 1999. La laboratorio estis kreita kelkajn monatojn poste. Ohi vidas kiagrade ĝi estas juna. Ĝi evidente estas agnoskata de la Fakultato de Sciencoj kaj de la universitato, sed per iliaj subvencioj oni povus aĉeti nur kelkajn krajonojn jare.

La seriozan aparataron konsistantan el maŝinoj novaj kaj potencaj kaj el diversaj mezur- kaj analizmezur-iloj ni ŝuldas al Jacques Théodor, kolego serĉisto nun emerita, kiu laboris en CNRS [Nacia Centro pri Scienca Studado], kiu posedas ampleksajn personajn financajn rimedojn kiujn li filantrope donacas al nia entrepreno; li ja financas la prezon de la "zetetika defio" je monsumo de 200.000 eŭroj.

LG **La sumo estas impresa, sed en kio konsistas tiu ĉi premio, kiel kaj kiucele ĝi estis kreita?**

**HB** Nu, jen ĝia historio: la universitato de Nice malfermis Minitel-an[3] servon sur la telematika reto en 1986, longe do antaŭ la komenco de la kurso? La servonomo estis 3615 ZET, "zet" estis la mallongigo de "zetetiko" La servonomo estis oficiale deponita ĉe la nacia komisiono "informadiko kaj libereco" fare de la Prezidanto de la universitato de Nice, kio montras ke nia zetetika agado jam estis agnoskata de la plej altaj aŭtoritatoj de nia universitato, kiu – mi memorigas al vi – estas sendependa, kiel ĉiuj aliaj en Francio. Konkrete, mi metis la dosieron en la Minitel-on kaj la Prezidanto de la universitato respondecis jure pri tiu ĉi informada ago. La akcepto de ĉi tiu respondeco ŝajnas al mi vera agnosko de la kvalito de nia laboro sub la etiketo "zetetiko" En tiu ĉi Minitela servo lokiĝis pluraj miloj da ekranopaĝoj klarigantaj la laŭdire paranormajn fenomenojn. Tiam, mi plie aldo-

nis al la servo jenan pruvalvokon al mediumoj: "Vi asertas ke vi posedas povojn, venu pruvi tion al ni!" Mi ekigis tion, kion mi ankoraŭ ne nomis "defio", kunlabore kun Gérard MAJAX, kiu rolis kiel konsilanta iluziisto, ĉar sciencisto nepre bezonas helpon de tia profesiulo, ĉar li, sola kun siaj nuraj konoj, ne estas armita kontraŭ eventuala mistifiko de trompisto.

LG Veras ke la iluziarto je servo de ulo kapabla uzi ĝiajn teknikojn, sen la bremso de moralaj skrupuloj, povas ege danĝeri.

**HB** Fizikisto ĝenerale emas fidi la naturon kaj la homon. Psikologo kutiminte je la homaj atestoj sendube estus pli singarda. Koncerne iluziiston konantan la postan flankon de la 'teatra dekoro', li rapidege detektas la ruzaĵon de trompisto.

LG La unua "defio", kiu ne nomiĝis tiel, datumas do de 1986.

**HB** Ĝuste, kaj la sekvantan jaron, en 1987, Jacques Théodor organizis kolokvon pri la paranormo, en la Libera Universitato de Bruselo. Mi estis invitita alporti mian ateston pri praktikado de zetetiko. Jacques Théodor, informita pri la ekzisto de la "pruvalvoko" ĉe Minitel, proponis al ni meti en la ludon monsumon por spici tion, kion samkubjete eknomiĝis "Zetetika Defio" Fakte Jacques Théodor vetmonigis sumon kiun, jam en 1982, li dediĉis al defiado de belgaj mediumoj.

LG Do, antaŭaĵo ekzistis antaŭ la nuna defio, ĉu?

**HB** Eĉ dum la 19a jarcento samspecaj defioj estis lanĉitaj. Dum la 20a jarcento pluraj aliaj sinsekvis.

LG Tio iĝis kvazaŭ tradicio?

**HB** Jes, sed tamen tio diferencas de la tradicio, kiam iu decidas vetmonigi grandan monsumon.

LG Ĉu ni rememoru ke temas pri 200.000 eŭroj?

**HB** Hodiaŭ jes, sed en 1987 la afero ekestis kun 500.000 FF Je la 100a kandidato Jacques Theodor decidis plialtigi la sumon je 1.000.000 FF, kaj por la 200a kandidato – kaj la kreado de nova monunuo – li pligrandigis la sumon je 200.000 eŭroj, t.e. ĉirkaŭ 1.300.000 FF Ĝis nun ni ekzamenis 253 kandidatojn. Nuntempe ni havas dekon da kurantaj eksperimentoj.



Jacques Théodor mecenato

LG Tia defio prezentas la ĉefan argumenton rebateblan al tiu kiu arogas al si la posedon de paranormaj povoj kaj ĝi ebligas ankaŭ averti la nesingardan naivulon kiu lasas sin trompi de ajna ĉarlatano. La diversaj eksperimentoj faritaj kun la kandidatoj montris ĝis nun do, ke la povoj anoncitaj kaj supoze kontroleblaj ne ekzistis, ĉar la 200.000 eŭroj plue estas la vetaĵo.

**HB** Ĝuste, la eksperimentoj, kiuj disvolviĝas laŭ antaŭdifinita protokolo kaj antaŭe akceptita de la du partneroj – la kandidatoj kaj ni mem – senescepte evidentigis ke la anoncitaj fenomenoj tute ne okazis.

LG Ĉu eblus ke la kondiĉoj de la provoj malfaciligu la efektojn de povoj al kiuj mankas rezulta reguleco?

**HB** Ne, la eksperimentaj kondiĉoj korespondas ĉiam al duobla blindeco, por 'izoli' la eksperimento-objekton disde la eksperimentantoj, kaj la kandidatoj, mediumoj aŭ 'psi'-uloj, komencas la eksperimenton nur kiam ili mem opinias ke ĉiuj kondiĉoj estas favoraj al apero de la 'paranorma' fenomeno.

LG Pro la ludmono eblas timi ke trompisto uzu artifikon aŭ iluzian trukon. Ĉu vi timas tian riskon? Ĉu vi jam senmaskigis trompistojn?

**HB** La risko reale ekzistas kaj necesas ne subtaksi ĝin; pro tio la konsiloj de la iluziistoj de la laboratoria teamo ege altvaloras. Trompistojn ni jam renkontis, sed unuflanke ĝis nun ili estis malpli ruzaj ol ni, kaj plue ili ne estas multnombraj. La tre granda plimulto de la personoj kiuj atakas la 'Defion' estas sinceraj; preskaŭ nenia provo de trukado okazis.

LG Sed nu, ĉu eblas, ke la mistifikulo estu ankaŭ sia unua kliento? Jen informo kiu tute ŝanceligas antaŭjuĝon kiun mi mem povus elmeti.

**HB** Efektive, ne estas unuflanke mistifikuloj kaj aliflanke kredemuloj. Kredemo kaj (mem)mistifikado ofte kunloĝas en la sama individuo. Tio certe estas materialo interesa por psikologo, kaj ankaŭ por la aliaj fakuloj pri la homaj sciencoj. La vojo al interfaka kunlaborado estas larĝe aperta. La zetetiko interesas la fizikiston, sed ĝi ne estas ekskluzive rezervita al li.

LG Ĉu oni povas konservi ĉi tiun ideon de malfermo kaj deseptigo inter specialaĵoj de la konado kiel enkondukon al la legado de via artikolo *La prizonoj de la menso*?

**HB** Ĉi tiu deseptigo estas necesa. Efektive, analizi la kredon, aŭ la kredojn, kiel – inter aliaj – konsekvencon aŭ produkton de procedo de sociiĝo, kiel klarigon de la mondo donantan sencon al la vivo, kiel psikan kuraĝigon kaj socian subtenilon aŭ kiel alibion al iaj agmanieroj, postulas nepran deseptigon kaj interfakan alproksimiĝon. Estas tiel por ĉiuj kiuj rilatas al la 'paranormo', eĉ por tiuj kiuj ŝajnas rilati nur al la fizikista kampo.

La prizonoj de la menso malfeliĉe multe pli oftas ol oni kutime supozas. Jen plua kialo por rekomendi gravan disvolviĝon de la zetetiko.

*LG = Jean-Pierre CAVELAN*

[1]Ĉirkaŭurbo norde de Parizo.
[2]Urbo proksima al Parizo.
[3]Minitel: tele-ekrano.

**ndlr:** *Ni atentigas niajn legantojn ke la intervjuo estas rekta, perparola kaj nepreparita de la intervjuito; en tiaj cirkonstancoj povis okazi eraroj, kiujn li rajtas korekti skribe en venonta numero.*